# Ekzercoj por VENUS' LA FINA VENK' --- Sceno ses

Rimarko: por solvi la taskojn, unue legu la sesan scenon de la teatraĵo ***Venus' la fina venk'.*** La teksto troviĝas en la LERNILOTEKO.

## 1) VORT-DIFINOJ

*Ligu la vortojn el la scenoj kun konvena difino. Vi havas du nebezonatajn difinojn, nur por malfaciligi vian tagon. Nedankinde!*

| | |
|---|---|
| 1. historio -------------------- | A. antaŭulo |
| 2. laboratorio -------------------- | B. denseco-mezuro |
| 3. stabano -------------------- | C. dungito |
| 4. praavo -------------------- | Ĉ. eksterordinara neklarigebla evento |
| 5. ĝisoste -------------------- | D. fariĝi malpli kvieta |
| 6. modela -------------------- | E. fervore kaj plene |
| 7. dimensio -------------------- | F. grandeco-mezuro |
| 8. miraklo -------------------- | G. loko kie sciencistoj esploras |
| 9. ekscitiĝi -------------------- | Ĝ. perfekta |
| 10. elektrono -------------------- | H. studo pri la estonteco. |
| | Ĥ. studo pri la pasinteco |
| | I. sub-atoma partiklo |

## 2) UNU EL KVAR

*Jen frazoj aŭ demandoj pri la sceno. Sed mankas vorto aŭ vortoj aŭ respondo. Vi jam imagas la ludon! Ni proponas al vi kvar alternativojn, el kiuj nur unu estas ĝusta. Elektu tiun!*

**1. Leks kaj Gori lasis Trevo sola ĉar ____________**
a) ili centprocente fidas lin.
b) ili estos forvoktiaj al la bufedo.
c) ili estis forvokitaj al sekreta laboratorio.
ĉ) ili estis forsenditaj al Venuso.

**2. Trev malkovris informon kiun li ne sciis: __________**
a) La sciencistoj sendos ilin al Venuso.
b) La projekto sendi lin al Venuso nomiĝas ETMENSA.
c) Li kunportos varbilojn al Venuso.
ĉ) Li iros al Venuso kun du aliaj personoj.

**3. Kion provos fari Trev denove por komuniki kun la esperantistoj?**
a) Telefoni.
b) Ŝui.
c) Ŝtrumpeti.
ĉ) Kalkanumi.

**4. Tiu kiu parolas Volapuke estas __________.**
a) Ŝlej
b) Deb
c) Leks
ĉ) Trev

**5. La aliaj komprenas la volapukan parolanton ĉar _________**
a) tiu havas tradukmaŝinon.
b) tiu havas tre klaran prononcon.
c) estas ege facile kompreni Volapukon eĉ ne lerninte ĝin.
ĉ) ili ĉiuj parolas la lingvon flue.

**6. Trev estas _____________ esperanitisto.**
a) ĝisgenua
b) ĝisbrusta
c) ĝisosta
ĉ) ĝis revida

**7. Deb havas ritmon sed ne akuzativon, ĉar ______**
a) en Ido la akuzativo ne estas deviga.
b) en Ido la akuzativo estas rigore malpermesata.
c) ŝi eĉ ne scias kio estas akuzativo.
ĉ) ŝi ne povas prononci la literon N.

**8. Tri homoj malaperis kaj sur Venuso ________**
a) aperis tri homoj.
b) aperis du homoj kaj banano.
c) aperis unu homo kaj du bananoj.
ĉ) ni ne scias ankorau kio aperis.

**9. Trev rajtas kunporti sian dorsosakon ĉar ĝi estas ______**
a) plena je varbiloj.
b) ene de la permesataj limoj.
c) ekster la permesataj limoj.
ĉ) necesa por ke la transigo sukcesu.

**10. Trev rapide ŝu-telefonis al la esperanstistoj por diri ke estos du aliaj voajaĝontoj: ____**
a) unu Idioto kaj unu Volatilulo.
b) unu Idisto kaj unu Volapukisto.
c) unu Idealisto kaj unu Voluptistino.
ĉ) du ĝisostaj esperantistoj.

## 3) MIKSITAJ VORTOJ

*Jen kelkaj vortoj el la sceno. Sed la literoj estas miksitaj. Malmiksu ilin kaj skribu la vortojn en la korespondaj spacoj aŭ kvadratoj. Fine, prenu la literojn kiuj sidas en la kvadratoj kaj rearanĝu ilin por malkovri la kompletigon de la kaŝ-frazo sube. En malmultaj kazoj (tre malmultaj!) ni kompatas vin kaj jam donas literon, sed nun tamen ne temas pri tia helpo.*

| | |
|---|---|
| B A T A N S O | ☐ __ ☐ __ __ ☐ __ |
| A N O D E M I S A | ☐ ☐ __ ☐ __ ☐ __ __ __ |
| P I N T E S K E R M E J O | __ __ ☐ __ ☐ __ __ __ __ __ __ __ ☐ |
| T I O D I S | ☐ __ __ ☐ __ |
| O R A T O R A B I L O | ☐ ☐ __ __ __ __ ☐ __ __ __ __ |

Kion eblas diri pri la ekstertempa transigo al Venuso fare de la triopo?

_ _ _   _ _ _ _ _   _ _ _ _ _ _ _ _.

## 4) DEMANDOJ

1. Kie alvenas Trev kaj kun kio? Kion sekretan li havas?
2. Kiu informo por Trev estas surprizo?
3. Kial Leks kaj Lari foriras kaj lasas Trev sola? Kion li tuj faras?
4. Trev uzas la esprimon 'Muŝo en la medikamento". Kion ĝi signifas?
   Kiun esprimon vi uzus en via nacia lingvo por esprimi tiun ideon?
5. Leks diris 'Ne tuŝu teknikaĵojn." Kial tiu estas amuza frazo en Esperantio/Esperantujo?
6. 'Trimbaŭ' ne estas vera vorto en Esperanto. Sed kion ĝi signifas?
7. Kiusence Trev, Deb kaj Ŝlej estas samideanoj? Kiusence ne?
8. De kie Deb kaj Ŝlej havas siajn nomojn?
9. Kion devas fari Trev pri sia sako? Kio enestas?
10. Kial la sciencistoj supozas ke la eksperimento sukcesis?

## 5) PARIGU

*Jen fraz-komencoj kaj fraz-finoj pri la sceno. Ligu ilin. Kio? Du superfluaj fraz-finoj? Nu, jes, sed vi jam kutimiĝis al tio. Kion alian vi atendu?*

| | |
|---|---|
| 1. La sendotoj estas je la punkto ŝanĝi...<br>2. Baldaŭ post la alveno Trev renkontis...<br>3. Trev diris ke li provos denove ŝui...<br>4. Trev devas kontroli...<br>5. Trev ne rajtas tuŝi...<br>6. Ŝlej komprenigas sin ĉar li uzas...<br>7. Trev havas...<br>8. Deb havas...<br>9. Ŝlej havas la...<br>10. Adela komencis... | A. tradukmaŝinon.<br>B. saman ideon kun la alia volapukisto.<br>C. la tutan stabon de la laboratorio.<br>Ĉ. la transigan algoratmon.<br>D. la teknikaĵojn.<br>E. la saman ideon kun aliaj idistoj.<br>F. la saman ideon kun aliaj esperantistoj.<br>G. la kunvojaĝantojn.<br>Ĝ. la fruktojn en la bufedo.<br>H. la fluon de historio.<br>Ĥ la dimensiojn de sia dorso-sako.<br>I. al la esperantistoj. |

**Daŭrigota. Serĉu la ekzercojn preparitajn por la aliaj scenoj.**
**La solvojn vi povas peti en retmesaĝo ĉe la redaktanto@edukado.net.**